
# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William Peace

ĵaŭdon, la 4-an de Julio, 2013 • numero naŭ

## Kio okazos hodiaŭ?




★ **8:30 atm – tagmezo: Lecionoj**
*Flowe, unua etaĝo*

★ **tagmezo – 4 ptm: libera tempo**
(por ripozi, pretigi valizojn, ktp.)

★ **4:00 – 5:00 ptm: Prezento pri retaj kunsidoj kaj diplomceremonio**
*Flowe, unua etaĝo*

★ **8:15 ptm: ekskurso por aŭskulti muzikon kaj vidi artfajraĵojn en la urbocentro de Raleigh**
(vidu mapon sur la tria paĝo)



*La NASKa Fasko*

**Redaktejo:** *Finley* 112
<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Daŭrigu la NASK-an sperton

*de Chuck Mays*

Je la 4-a vespere, en la unua etaĝo de Flowe, Chuck Mays (kaj aliaj) montros al vi kiel uzi *Google+* por konversaciaj rondoj.

Se vi ŝatus helpon por instali Google+ en vian porteblan komputilon, alportu ĝin al la kunsido.

Post NASK, Chuck kaj Ĵenja Bondelid kunvokos konversacion grupon ĉiusemajne.

La grupo mem decidos, kion ili volas fari dum ĉiu horo-longa kunsido por ke la bezonoj de la partoprenantoj estu plenumitaj. La kunvokantoj provizos gvidon, strukturon kaj proponojn.

Ni determinos la tagon de la semajno kaj la horon surbaze de la deziroj de la partoprenantoj. Ĉar Chuck estas ĉe la orienta flanko kaj Ĵenja estas ĉe la okcidenta flanko de Usono, eble ni faros du grupojn se estos sufiĉe da intereso.

Se vi interesiĝas, parolu kun Chuck aŭ sendu retpoŝton al: <**Charles.o.mays@gmail.com**>.

## Continue the NASK Experience

*de Chuck Mays*

At 4 p.m. on the first floor of Flowe, Chuck Mays (and others) will show you how to use Google+ for conversation groups.

If you would like assistance in setting up Google+ on your computer or iPad, bring it to the demonstration.

After NASK, Chuck and Ĵenja Bondelid will convene a conversation group each week.

The group itself will decide what they are interested in doing during the hour-long session so that the needs of the participants are met. The conveners will provide guidance, structure and suggestions.

The day of the week and time will be determined based on the desires of the participants. Since Chuck is on the East Coast and Ĵenja is on the West Coast of the USA, two groups will be considered if there is enough interest.

If you are interested, talk to Chuck or email him at: <**Charles.o.mays@gmail.com**>.

## *English-Vinglish*




*de Bala Guruswamy*

*[Noto de la redaktisto: lundon nokte, Bala montris al ni la filmon* English-Vinglish. *Jen lia priskribo.]*

Jen filmo de Barato. La filmo ne estas pri Barato mem, sed pri histeria virino kiu ne konas la anglan. Ŝi sentis sin malsekura de sia familio kaj la socio.

Amuza, kortuŝa kaj sentema filmo. Sashi instruis al la mondo lecionon pri kiel esti memfida virino.

# Esperanto: homa mirindaĵo

*de Prof. Ricardo Salazar Crespo*

En la jaro 1965, kiam mi estis 18-jara, mi ekkomencis lerni Esperanton aŭtodidakte. Mia ĉefa kaj unika helpilo estis instrulibro de Alberto Gomez Cruz el Meksiko. Ĉar tiutempe mi estis lernanta la universalan lingvon, ne mankis tiuj, kiuj taksis min kiel frenezulon.

En 1966 mi transloĝiĝis al Cascorro, kaj kune kun mia laboro kiel instruisto, mi daŭrigis memlernadon de la lingvo. En 1979 estis fondita Kuba Esperanto-Asocio, kaj mi fariĝis fondinta kaj honora membro de KEA.

Mi neniam forgesos, kiam mi ekkomencis instrui Esperanton, iu funkciulo de la municipa edukestraro esprimis: "mi proponas kontroli profesoron Salazar ĉar ŝajnas, ke li instruas iaspecan religion." Tamen, mi daŭrigis la instruadon kaj 14 lernantoj ricevis diplomon de la tria nivelo.

En 1990 mi partoprenis en la 75-a UK en Havano. Jam tiutempe, dank' al Esperanto mi sentis min pli libera homo, kaj nova mondo pli kaj pli malfermiĝis antaŭ miaj pli vidkapablaj okuloj. En 1998 mi sukcesis vojaĝi en Nederlandon kaj tiam mi vizitis aliajn kvin eŭropajn landojn. Dank' al konsiloj kaj helpo de mia frata usona samideano William R. Harmon, mi ĉeestis la 83-an UK en Montpeliero. Dum tiu trimonata vojaĝo mi vizitis kelkajn universitatojn, interesegajn muzeojn, promenis tra la Hago, Zaragozo, Madrido, Barcelono, kaj restis unu semajnon en Parizo.

Pere de Esperanto mi kunordigis kun eksterlandaj neregistaraj asocioj por ricevi helpon por mia urbeto, Cascorro, kaj nur blindeco de utopiaj funkciuloj malebligis la esprimon de multvariaj profitoj por mia popolo.

Esperanto alportis al mi multnombrajn bonaĵojn, feliĉigis/as mian ekziston, malfermis novan mondon, pli ampleksigis mian ĝeneralan kulturon, kaj konatigis al mi diverslandajn kaj specialajn geamikojn.

Tiu ĉi vojaĝo al Usono, ĉeesti la NASK-kursaron kaj partopreni en via nacia kongreso, plenumis revon, kiu eniris en mian koron antaŭ multaj jaroj.


Tial emociplene, kun mia koro plenvapore, mi brakumas ĉiujn kaj restas eterne dankema al ĉiuj, kiuj min helpis realigi mian miraklan revon.

# Interesa vizito

*de Elizabeto Dorcas*

Pasintsemajnfine ni vizitis nian nevon, doktoron Mike Dorcas kaj familion en Huntersville, Norda Karolino.

Li estas konata kaj jam publikiginta herpetologiisto, profesoro de la universitato Davidson kaj profesia esploristo pri reptilioj kaj amfibioj. Jen liaj retejoj:



Familianoj kun "Karmalita" (Burma pitono)

http://www.bio.davidson.edu/dorcas
http://www.bio.davidson.edu/people/midorcas/research/Reprints/Reprints.htm

Ni havis okazon "koni" iujn el la bestoj de lia laborloko. Jen foto, supre!

# La bona paŝtisto

*Enesperantigis: Vicente Valdes Bejarano*
*Originale verkita de Luis de Gongora y Argote en la hispana, dum ties ora jarcento.*

Ho, venu perdita ŝaf'
sur mian dorson; ĉar nun
ne paŝtisto mi estas nur
sed ankaŭ por vi, via nutraĵ'.

Por pli bone malkovri vin
kiam vi mekadis perdita,
la vivon mi lasis pendita,
kien pro l' am' supreniris mi,
se pruvoj ja vokus vin,
miajn agojn montros mia pac'.

Ho, venu perdita ŝaf'
sur mian dorson; ĉar nun
ne paŝtisto mi estas nur
sed ankaŭ por vi, via nutraĵ'.

Nutraĵo al vi jen mi; pastoro.
Kiu miron plejan donos:
ĉu vin surporti mi en mia dorso
aŭ vi alporti min en koro?
Jen ampruv', perfekta gloro
kiun eĉ vidas la blindular'.

Ho, venu perdita ŝaf'
sur mian dorson; ĉar nun
ne paŝtisto mi estas nur
sed ankaŭ por vi, via nutraĵ'.

## Enigmo-solvoj

*Jen la solvoj de la hieraŭaj anagram-enigmoj:*

1. kolorada arda loko
2. roma maro
3. roterdama drama tero
4. sonora sonaro
5. lavi Vail
6. ade la ido (en) Adelaido

# Venu por muziko kaj artfajraĵoj!

Hodiaŭ estas tago kiam Usono festas la datrevenon de sia sendependiĝo en la jaro 1776. La 4-a de Julio estas nacia ferio kiam oni iras eksteren por ĝui paradojn, ludojn, konkursojn, krad-rostitajn manĝaĵojn, kaj diversajn ceremoniojn.

En la urbocentro okazos pluraj senpagaj programoj dum la vespero: bandoj ludos divers-stilan muzikon, oni konkursos pri manĝado de kolbasoj kaj elsputado de akvomelonaj semoj (jes, vere!) kaj multe pli.

**Poste, la urbo prezentos ne nur unu, sed du artfajraĵajn spektaklojn je 9:15 kaj 10:10 ptm.** Laŭdire, oni povas rigardi la artfajraĵojn de la universitata kampuso, do ne nepre necesas ekskursi. Por tiuj, kiuj tamen volas pliproksimiĝi al la festo, **Hoss invitas vin iri al la urbocentro je 8:15 ptm. Ni ekiros de la komuna ĉambro en la unua etaĝo de Finley.** Eblas piediri al nia celo (ĝi situas iom preter la muzeoj, kiujn ni vizitis antaŭ kelkaj tagoj), aŭ oni povas trafi la buslinion "R-Line" – sed plej verŝajne, la busoj estos plenŝtopitaj. Jen mapo de la vojo, kiun ni sekvos. Je la dorsa flanko de la paĝo vi trovos pli da informo (bedaŭrinde nur en la angla; se vi bezonas tradukon, demandu al Hoss, kaj li feliĉe tradukos por vi.)




# Legu kaj verku

*de Jozefo* NUGENT

Pasintnokte mi trovis bonegan aferon. Se oni metas la vorton "Esperanto" en la serĉilon de la elektronika legilo *Kindle*, oni trovos multe da Esperantaj libroj. Ekzemple, mi vidis la libron *Marvirinstrato* de Tim WESTOVER (en Esperanto). Tim estas samideano.

Se vi havas demandojn pri kiel verki librojn por Kindle, parolu al mi. Mi verkis sep librojn por Kindle en la angla!




## Budhismaj ligiloj en Esperantujo

*de Steĉjo* SCHWICHOW

- **Budhana Ligo Esperantista:** http://groups.yahoo.com/group/Budhana_Ligo_Esperantista/
- **Ŭon-Budhismo:** http://wp.uonbulismo.net/
- **Budhana Retejo Esperantista:** http://www.budhano.cn/
- **Japana Budhana Ligo Esperantista** http://www001.upp.so-net.ne.jp/jble/budhismo.html
- **Esenca Sutro por Saĝo-Perfektigo:** http://www.fodian.net/world/0251esp.html
- **LA 42 ĈAPITROJ:** http://esperanto.us/Budhanaj/42Cxapitroj.html
- **La Instruoj de la Budho:** http://esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=product_info&cPath=20_330&products_id=7590

## *Tribo*

*de Maria Nazaré de C. Laroca*

La urba tribo
Eltrovis programeton
Por l' aŭtomata feliĉo.

Uzante aŭskultilojn
Kaj la saman uniformon,
Ĉiuj kuras ĉiutage
Ĉirkaŭ la parko.

Kaj neniu ajn perceptas,
Ke l' aŭtuno adiaŭas:
Eĉ la placon ili ne vidas.